

## & Mia patrujo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 451 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per rusa melodio modifita kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,5:41> (

/mimi mima mimi doTi LaLa; LaLa SiLa TiTi SiFi MiMi; MiMi SiTi rere fami mimi;  
MiMi SiLa Tire doTi LaLa;

(#Rekantaĵo: SiLa Ti SiFi Mi; LaTi do LaFa Mi; SiLa Ti Mi fa re fami ima mi i; Mi  
do La a)

)×11 )+

### (& Strofoj:

'1 /Ne sub tondra bruoj de l' tamburoj ;  
Kaj ne kun bravuraj marŝaj vortoj, -- ;  
Sen vendema flato de l' aŭguroj, ; Sen  
armila brilo kaj eskortoj.

(×: **Ni trankvilu2 nun ; dum turniĝas  
la sun' ; kaj leviĝas ĉiam nova esper'  
; kun la sun'.**)

'2 Mi vin vidas, kara Patrolando. ; Vi  
aperas antaŭ mi dolora, ; Sed en via  
plena, sankta grando: ; Bonanima kaj  
serene-kora. ....

'3 Viajn manojn kovras kaloj krustaj, ;  
Sur la ŝultroj -- vesto memfarita, ; Kaj  
la vortoj simplaj, vortoj justaj ;  
Sigeliĝis sur la buŝ' fermita. ....

'4 Vian tutan belon de l' okuloj ; Mi sen  
larma roso ne eltenas; La animo dronas  
en la bruloj, ; Kaj la koro, sopirante,  
svenas. ....

'5 Vi renkontas min kun vort' riproĉa, ;  
Kun patrinaj fido kaj admono, ; Sed en  
ĉiu diro severoĉa ; Sonas mildaj notoj  
de l' pardono. ....

'6 Alte kronas vin unika suno, ; En la  
klaraj larmoj freŝlavita -- ; La Fenikso  
de la monda junco, ; Renesanco de la  
viv' civita. ....

'7 Sed kun via nova kredo flama ; Je la  
venko de la bravaj koroj, ; De ekstere  
restis vi la sama, ; En pejzaĝoj, bildoj  
kaj koloroj: ....

'8 Buklaj pinoj, poploj kaj tilioj, ; Kaj  
sekalaj kampoj kiel maro, ; La ĉielo en  
paletaj strioj ; Ĝis la denta rando de l'  
arbaro; ....

'9 En majesta fluo la riveroj ; Larĝe  
siajn disetendas bordojn ; Kaj kolosaj  
montoj en fiero ; Mute gardas  
kontinentajn pordojn. ....

'10 Ofte, ofte havas mi minutojn ; De  
malĝojo, tremas kaj sopiras, ; Tiam  
sentas mi la salajn glutojn ; Kaj la  
brusto tre profunde spiras; ....

'11 Tiam ĵetas sin sur la genuojn ; Al  
piedoj viaj peka filo, ; Ĉirkaŭprenas la  
truitajn ŝuojn ; Kaj la teron kisas en  
humilo. .... )